

# EKO 2025

Bleko  
kun eĥo

EKO 2025-02, Jan. 8. Sume 390 KB

## Volontula Asocio aktiva tra Azio

El la parolado la partoprenantoj informiĝis, ke la klubo atingis kelkajn rezultojn:

- la kursanoj de la klubo venas el la tuta lando, krome Tibeto, Honkongo, Makao kaj Tajvano per retaj Esperanto-kursoj;
- la klubo atingis la Esperanto-disvastigon en tutlanda skalo per funkciigo de reta Eo-kurso por Ĉina Asocio de Volontuloj. La klubo sukcese faris la prelegon pri Esperanto por *La Novaĵa Lernejo* de Liaoninga Komunika Universitato,
- la klubo havas Esploran Bazon de Esperanto kaj Proteino-Saliko en Interna Mongolio, kie ĉi-jare dufoje okazis aktivadoj pri Esperanto-instruado.

S-ro Wang Hanping, vic-prezidanto de ĈEL, kiu prezidis la simpozion.

## Alvoko de ILEI de Ahmad Mamduhi disvastigita tra Ĉinio

Nun *We-Chat* estas rapida kanalo per kiu oni kontaktas ĉinajn esperantistojn.

Mi renove redaktis la suban mesaĝon kaj sendis ĝin al tiuj esperantaj grupoj *We-Chat*, (Viĉato) inkl. la grupon de la komitatanoj de Ĉina Esperanto-Ligo. La plejparto de ĉinaj esperantistoj kaj kelkaj eksterlandaj esperantistoj jam legis ĝin.

Wu Guojiang, prezidanto de Liaoning-a Esperanto-kultura Klubo, Ĉinio

## Januaraj jubileoj jenas

En la listo de jubileoj kaj memordatoj en januaro 2025 estas pluraj eminentaj esperantistoj (Hans Bakker, Vasilij Jeroŝenko, Louis de Beaufront, Hippolyte Sebert, Harold Bolingbroke Mudie k. a., kaj du Zamenhofoj: la filo Adamo kaj nepo Ludoviko).

En januaro okaze de sia 60-jariĝo gratulojn akceptis kaj akceptos Kalle Kniivilä.

Legu la liston en "La Ondo de Esperanto" ĉe <https://sezonoj.ru/2025/01/januario-9/>

## Brazila muziko – du bildoj

Jen tri novaj sekretaj partituroj, ekskluzivaj por la abonantoj de la Muzika Klubo:

- **Sambo de Arnesto** (originale *Samba do Arnesto*), verkita de **Adoniran Barbosa**.
- **Tiel mi bezonas vin** (originale *Eu preciso de você*), verkita de **Tom Jobim**.
- **Troltreno** (originale *Arrastão*), verkita de **Edu Lobo** k **Vinicius de Moraes**

Lette Lêla

## Aminde el Madagaskaro

Jen la elsendo numero 144 de Aminda Radio Esperanto el Malagasio. Krom kelkaj lokaj novaĵoj, ni provizas al vi ankaŭ artikolon pri la situacio de la tradukado kaj

interpretado en nia lando. Se nia retradio helpas vin pli scii pri Malagasio, ne hezitu finance subteni ĝin cele al ĝia materiala plibonigado. <https://youtu.be/xQ5LndCfXQE>

El la elsendo 147, jen pliaj informoj.



La plej freŝa epizodo de nia podkasto nun disponeblas. Ĉi-monate, ni proponas al vi riĉenhavan elsendo kun du gravaj temoj: - Aktualaj novaĵoj el Malagasio – Sekvu la plej gravajn eventojn de la monato. - Speciala raporto pri la tradicia ŝtofo Lambahoany – Malkovru la kulturajn kaj sociajn aspektojn de ĉi tiu simbolo de la malagasa identeco.



**De nun, niaj podkasto havas kompletajn subtitolojn. Eĉ komencantoj en Esperanto povas ĝui niajn elsendojn.**



Abonu nian kanalon kaj kundividu ĉi tiun podkaston kun viaj gesamideanoj!  
#malagasio #esperanto #podkasto #malagasakulturo #radioenesperanto #lambahoany  
<https://youtu.be/r46v4jB42K4>

Henriel FIDILALAO, Madagaskaro

## **Konga stelo – legu pri lando kun multaj esperantistoj!**

Ekde julio 2024 aperas, sub la redaktora laboro de Joel Muhire, la ILEI-sekciestro en DR Kongo, nova Esperanto-revuo *Konga Stelo*. Temas pri projekto, celanta doni platformon al Esperanto-instruantoj, klubestroj, unuopaj esperantistoj el ĉiuj fonoj, kaj kongaj esperantistoj aparte, por esprimiĝi, montri pri siaj iniciatoj. Bv. legi pli ĉe <https://www.esperanto-afriko.org/2025/01/06/nova-revuo-konga-stelo/>

Mi prezentas al vi la 3-an numeron de Konga Stelo.

[https://uea.org/vikio/Dosiero:Konga Stelo 3.pdf](https://uea.org/vikio/Dosiero:Konga_Stelo_3.pdf)

Joel Muhire.

## **ILEI invitas arde Beograden**

Serbia Esperanto-Ligo (SEL) invitas vin al la **58-a kongreso de ILEI** (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kiu okazos unuafoje **en Beogrado, de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2025!** Ĉi tiu evento estos neforgesebla okazo por kunveni lerni kaj ĝui la unikan etoson de la ĉefurbo de Serbio. La ĉefa temo de la kongreso kaj ties simpozio estas: **Artefarita intelekto kaj lingvolernado.**

Abundos la turisma kaj kultur-arta programo en la tradicia amika etoso de la ĉefevento de ILEI. Ĉu vi estas ILEI-membro aŭ ne, ĉiuj estas bonvenaj! Ni bonvenigas ankaŭ lernantojn, homojn, kiuj interesiĝas pri instruado, kaj ĉiujn esperantistojn de kiu ajn lingvo-nivelo. Jen pliaj informoj:

- Retejo de la kongreso: [2025.kongreso.org](https://2025.kongreso.org) (klaku al la logotipo de ILEI por pluri al la ĉefa paĝo) aŭ [2025.kongreso.org/ilei-chefa.html](https://2025.kongreso.org/ilei-chefa.html)
- Rekta ligilo al la aliĝilo: [2025.kongreso.org/alighilo.html](https://2025.kongreso.org/alighilo.html)
- Eventaservo: [eventaservo.org/e/ILEI-58](https://eventaservo.org/e/ILEI-58)

Mia ĝojo estos renkonti vin en Beogrado por la [58-a Kongreso de ILEI](#),

kiu jam havas 22 aliĝintojn el 10 landoj el 4 kontinentoj, de Brazilo ĝis Koreio.

La 26-an de julio estos busa karavano al Brno por la UK. Aliĝu tuj por ĝui rabaton!

<https://eventaservo.org/e/ILEI-58>

Radojica Petrović, Serbio, Estrarano de ILEI, Vicprezidanto de LKK 2025

## Balkana kunlaboro

Partoprenis pli ol 16 esperantistoj el Albanio, Bosnio, Bulgario, Hungario, Kroatio, Rumanio, Serbio kaj Ukrainio. Estis prezentitaj regionaj eventoj:

- 1 Ronda Tablo pri Lingvo kaj artefarita intelekto en Sarajevo, 20-21 februaro 2025
- 2 La 13-a Kongreso de kroataj esperantistoj en Slavonski Brod en majo 2025
- 3 La 2-a Adriatika Feriado en Prvić Luka sur insulo Prvić apud Šibenik en junio/
4. La 58-a Kongreso de ILEI (vidu la apartan artikolon.

Estis raportoj pri la Zamenhofaj Tagoj en Albanio, Aŭstrio (pere de la bulgarino Raja), Kroatio, Hungario, Rumanio, kaj pri kursoj en Serbio. Oni diskutis pri kotizoj, aliĝoj, planata vojaĝo de Josip Pleadin tra Balkanio kaj la kongreso de nevidantoj en Grezijono

## Zamenhofa memoro en Litovio

La 14-an kaj 15-an de decembro en Kaŭno okazis la 59-a kongreso de Litova Esperanto-Asocio kaj la tradiciaj Zamenhof-Tagoj. Legu en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* artikolon pri ĉi tiuj sinsekvaj aranĝoj kaj pri la ampleksa kaj riĉa Esperanto-agado en Litovio dum la 2024a jaro — <https://sezonoj.ru/2024/12/litovio-79/>.

## Ronda tablo en Sarajevo februare

Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino organizas scienca kunvenon pri la temo **Artefarita intelekto kaj lingvolernado** kun la celo debati pri diversaj aspektoj kaj demandoj de lingva evoluo kaj tiurilataj ebloj de aplikado de artefarita intelekto (AI). Al la Ronda Tablo estas invitataj esploristoj kaj fakuloj el la sferoj de lingvoscienco, edukaj sciencoj, komunikologio, sociaj sciencoj kaj informadikaj teknologioj por interŝanĝi siajn spertojn kaj esplorojn partoprenante krome en sagacaj debatoj pri uzado de artefarita intelekto en esplorado de lingvo, en didaktiko, pri influo de maŝina tradukado al lingvo, ties etika uzado, postredaktado ktp. La Ronda Tablo okazos la 20-an kaj 21-an de februaro en Sarajevo. En ĝi partoprenos invititaj kaj aliĝintaj fakuloj kaj interesiĝantoj el Bosnio kaj eksterlando. Laborlingvoj de la kunveno estos la bosnia/serba/kroata kaj Esperanto. Aŭspicianto de la Ronda Tablo estas la Federacia Ministerio pri Edukado kaj Scienco. Por pliaj detaloj, dezirinda kunlaboro kaj aliĝebloj bonvolu kontakti: ELBH, Kralja Tvrtka 19, BA-71000 Sarajevo, Bosnio aŭ rete: [info@esperanto.ba](mailto:info@esperanto.ba)

## La Vic-prezidanto de UEA pri la scienca laboro

Se vi interesiĝas pri scienca agado en Esperantujo, mi prelegis kun sekva diskuto kadre de la IKEF-dimanĉa kunveno. Ni trarigardis la lastatempan scienca agadon - la sciencaj programoj dum la UK kaj VK de 2024 estas raportitaj en la januara n-ro de Esperanto. Pliaj kunvenoj kaj evoluo okazis kaj okazos, kiel la IVU (en la NR kaj Luminesk), SUS-41 en BET, la IKU-AIS sesio en Brno, SUS-42 dum la Itala Kongreso, revivigo de ISAE

Amri Wandel

## La maratonsimila dumonata projekto -

la Internaciaj Letertagoj *Vorto Pri Samarkando 2024* estis sukcese realigita. Ni publikigis plurajn reeĥojn en la regionaj kaj tutlandaj periodaĵoj, paperaj, televidaj kaj retaj amas-komunikiloj... Tradicie, la projekton partoprenis multaj ekstermovadanoj kune kun konataj diverslandaj intelektuloj ks.

<https://sv.zarnews.uz/post/slovo-o-samarkande-planeta-pozdravlyaet>

<https://sv.zarnews.uz/post/slovo-o-samarkande-zvuchit-so-vsex-ontinentov>

<https://sv.zarnews.uz/post/pismo-mirzo-ulugbeku-ot-nobelevskogo-laureata>

<https://sv.zarnews.uz/post/slovo-o-samarkande-2024>

<https://sv.zarnews.uz/post/o-samarkande-na-yazke-esperanto>

<https://sv.zarnews.uz/samarkandiana>

Anatolij Ionesov

## Burunda jarfina seminario

La seminario okazis de la 20-a ĝis la 22-a de decembro 2024 en la Esperanto-Centro en Rumonge. Partoprenis esperantistoj el Buĵumburo, Rumonge kaj Nyanza-Lac. Vidu la akompanan afiŝan bildon! **Alk estas 1p.**

## Ekzamenoj ofertataj en 2025 en norda Serbio

Dum nia kunveno mi mallonge menciis la UEA-KER-ekzamenojn kaj donis la ligilon tra la babilejo, sed jen mia propono denove, por ĉiuj membroj de la listo.

**Pripensu pri UEA-KER-ekzamenoj**, kiuj en 2025 okazos ĉefe rete (sed ne nur) – **la akiro de internacia atestilo pri Esperanto povus esti unu el la celoj por 2025.**

**Se vi jam nun interesiĝas je niveloj B1, B2, C1 aŭ C2, bonvolu plenigi la**

**enketilon** Ĝi estas nur enketilo pri KER-ekzamenoj en 2025, por ke la organizantoj sciu pri la preferoj de potencialaj kandidatoj rilate la nivelojn kaj tempon de la ekzameno. La enketilo ne estas aliĝilo! <https://edukado.net/ekzamenoj/ker/enketilo>

Aranka Laslo, **Instruista sekcio de Serbia E-Ligo**,

===== vortoj: 1320 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikaĵoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikadoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

## La 44 numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikadojn pere de retlisto.